William Wordsworth,

# Die Narzissen

*tradukita de Hans Hennecke*

Argiope-informo:
La aspekto de tiu ĉi versio estas barita.
Supozeble la aŭtoro decidis tion.

...

William Wordsworth,

# La narcisoj

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Migrante super mont' kaj val'
samkiel nubo ĉe l' ĉiel',
subite mi ekvenis al
narcisa kamp' kun ora bel',
jen apud lago, ĉe arbar'
en briz' ondanta kiel mar'.

Seninterrompe kiel la
stelaroj de la galakci'
etendis plurdekmiloj da
ĉi tiuj floroj en lini'
laŭlonge de l' lagbordo sin,
en longaj vicoj kaj sen fin'.

La ondoj dancis, la brilet'
de l' floroj min impresis pli;
ja devas ĝoji la poet'
en tia ĉarma kompani'.
Rigardis kaj rigardis mi
kaj min riĉigis tio ĉi.

Ĉar ofte, kiam kuŝas mi
trankvile sur la sofo re-
aperas tiu bildo ĉi,
kaj tiam reokazas, ke
ekĝojas mia kor' en mi,
kun la narcisoj dancas ĝi.

...

William Wordsworth,

# Dafodiloj

*tradukita de Krys Ungar*

Mi vagis sola kiel nub'
Altflosas super la kampar'
Kaj tiam tuj aperis trup'
De dafodiloj; ora ar'
Apud la lag', sub arba tend'
Flirtis kaj dancis en la vent'.

Senbreĉe kiel astra bril'
Sur Lakta Voj' flagretas, jen
Sterniĝis ili en defil'
Senfine laŭ la laghaven'.
Rigardon kaptis la balanc'
De dekmil kapoj en la danc'.

Apudaj ondoj dancis, sed
Triumfon gajnis floroj ĉi,
Devigis gajon de poet'
Plej joviala kompani':
Mi rigardadis sen atent',
Ke min riĉigos la prezent'.

Ĉar ofte, kiam kuŝas mi
Penseme, aŭ en menslangvor',
Ekfulmas ili tra l' konsci' -
La beno de solema hor';
La koro pro pleniga ĝu'
Kun dafodiloj dancas plu.

...

*Traduko de la Angla poemo "The Daffodils" de* William Wordsworth *(∗1770 – †1850) en la Germanan de Hans Hennecke.*

*Arg-39-75 (2004-02-01 18:36:59)*

*Germanigo de la origina anglalingva teksto de WILLIAM WORDSWORTH, fare de Heneko, Johano (HANS HENNECKE). (Mi trovis tiun ci poemon en la libro „Snapshots of Britain" / „Britannien in kleinen Geschichten", rakontita de JOY BROWNING, eldonejo Deutscher Taschenbuchverlag, ISBN 3-423-09319-6.)*

*Traduko de la Angla poemo "The Daffodils" de* William Wordsworth *(∗1770 – †1850) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 1997-03.12.*

*Arg-39-74 (2014-09-02 14:14:50)*

*Verkita de la poeto Vordzvorto, Vilhelmo (1770 - 1850). Esperantigis: Manfredo Ratislavo (Manfred Retzlaff) en 1997-03-09 laŭ la origina anglalingva teksto.*

*Traduko de la Angla poemo "The Daffodils" de* William Wordsworth *(∗1770 – †1850) en Esperanton de* Krys Ungar *(Krys Bottrill).*

*Arg-39-632 (2009-09-20 15:01:36)*